

Espero Katolika



Numero 4-6/2016

Aprilo-Junio 2016



Sur la kovrilo: Statuo de sankta Katarina el Siena. La 29-an de Aprilo la Eklezio festas sin. De la Sanktulino aperas en ĉi tiu numero prezento kaj unu el ŝiaj leteroj al Papo Gregoro la 11-a (v. p. 29).

ENHAVO

| | |
|--|----|
| “AMORIS LAETITIA” | |
| La postsinoda apostola instigo pri la amo en la familio | 19 |
| JUĜPROCESO AL JUĜISTO | |
| Pri Pilato, unu el la juĝistoj de Jesuo | 20 |
| “NUR SENFINA MIZERIKORDO POVAS DONI AL NI LA SAVON” | |
| Paska Mesaĝo de la Papo 2016, Placo Sankta Petro, 27.3.2016 | 22 |
| «ANKAŬ MI SONGĜAS EN ESPERANTO....» | 23 |
| LA KVAR BIBLIAJ TAGOJ EN BAIA MARE (Rumanio) | 24 |
| NITRA, LA URBO DE “NIA 69-a” (dua parto) | 26 |
| SANKTA KATARINA EL SIENO | |
| Biografio | 29 |
| Ŝia letero al Papo Gregoro la 11-a | 30 |
| PIERRE TEILHARD DE CHARDIN (1881-1955) | |
| La “malpermesita” Jezuito | 31 |
| Radio Vatikana, 32 | |

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italia

Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> * Dissendolisto: <ikue@yahoo.com>

UEA-konto “ikue-v” * Banko: “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italia
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPITRRXXX

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italia
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli - **Vic-Prezidantino:** Marija Beloŝević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

AMORIS LAETITIA, PRI LA AMO EN LA FAMILIO

“Amoris laetitia” (“La ĝojo de la amo”) estas la titolo de la postsinoda apostola Instigo, publikigita la 19-an de Marto, kiu entenas la rezultojn de du Sinodoj pri la familio, kiujn Papo Francisko arigis en 2014 kaj 2015: iliaj finaj raportoj estas vaste citataj, kune kun dokumentoj kaj paŝtistaj instruoj de Francisko mem kaj de liaj antaŭuloj pri la familio. Tamen, kiel okazis por aliaj similaj dokumentoj, la Papo uzas ankaŭ la kontribuojn de pluraj episkoparaj konferencoj (Argentino, Aŭstralio, Kenjo...) kaj citaĵojn de

ke «ne ĉiuj la doktrinaj, moralaj aŭ paŝtistaj diskutoj devas esti solvitaj per intervenoj de la paŝtista instruado de la Eklezio». Do, por kelkaj temoj «en ĉiu lando aŭ regiono oni povas trovi pli enkulturigitajn solvojn, atentajn je la lokaj tradicioj kaj defioj. Fakte, “la kulturoj estas tre malsamaj inter si kaj ĉiu ĝenerala principo [...] bezonas enkulturigon, se oni ĝin volas observata kaj aplikata”».

Sed ĉefe la Papo tuj kaj nete deklaras, ke oni devas eliri el la sterila kontraŭmeto inter la



maltrankvilo ŝanĝi kaj la pura kaj simpla apliko de abstraktaj normoj. Li skribas: «La debatoj en la amaskomunikiloj aŭ en la eldonaĵoj kaj eĉ ĉe la paŝtistaj servantoj de la Eklezio iras de la senbrida deziro ŝanĝi ĉion sen sufiĉaj meditoj aŭ fundamentoj, ĝis la sinteno, kiu pretendas solvi ĉion aplikante ĝeneralajn normojn aŭ ĉerpante troigajn konkludojn

signifaj personoj, kiel Martin Luther King aŭ Erich Fromm. Aparta estas la citaĵo el la dana filmo “Babettes gæstebud” (la tagmanĝo de Babette), kiun la Papo memorigas por klarigi la koncepton de senpageco.

La apostola Instigo impresas pro sia vasteco kaj strukturado kaj ĝi aspektas kvazaŭ poemo en prozo disigita en naŭ ĉapitroj: 1) Je la lumo de la Vorto, 2) La realo kaj la defioj de la familioj, 3) Rigardo direktita al Jesuo, 4) La amo en la geedziĝo, 5) La amo fariĝanta fekunda, 6) Kelkaj paŝtistaj perspektivoj, 7) Plifortigi la edukon de la filoj, 8) Akompani, distingi kaj integri la fragilecon, 9) Geedza kaj familia spiriteco.

Ĉiu ĉapitro estas siavice disigita sume en 59 subĉapitroj kaj ĉi tiuj en 325 paragrafoj. En ili oni deklaras, ke la intervenoj de la Patroj dum la Sinodoj konsistigis «valoran poliedron», kiun oni devas konservi. Ĉi-sence la Papo skribis,

el kelkaj teologiaj meditoj».

Papo Francisko konsilas ne rapidan kaj ĝeneralan legadon de la Instigo, sed paciantan pliprofundigon de unu parto post la alia, kie ĉiu elserĉos tion, kion li bezonas. Estas probable, ke la geedzoj rekonos sin en la ĉapitroj kvara kaj kvina, ke la paŝtitaj kunlaborantoj pli interesiĝos pri la sesa ĉapitro, kaj ke ĉiuj sin trovas alvokataj de la oka ĉapitro.

Ĉi tiu oka ĉapitro estis tiu pli atendata de la amaskomunikiloj, ĉar ĝi alfrontas la temon de la neregulaj situacioj (kunvivado, nur civila geedziĝo, ekسدziĝintoj reedziĝintaj, samseksema kuniĝo, miksitaj geedziĝoj). En ĉi tiuj situacioj estas gravaj la akceptado, la akompanado kaj la komprenkapablo de la apartaj situacioj, en la spirito de la Jaro de la Mizerikordo. Tamen, pri ĉi tiuj temoj, la sinteno de la Eklezio restas esence neŝanĝata. ■

JUĜPROCESO AL JUĜISTO

Anas kaj Kajafas, ĉefpastroj; Herodo Antipa, tetrarĥo de Galileo kaj Perea; Pontio Pilato, romia provincestro de Judujo: ili ebligas, diverskiale, kronologie loki la Pasionon kaj morton de Jesuo.

Pilato ricevis la privilegion esti menciita ankaŭ en la kristana Kredkonfeso, kaj ŝajne kun sufiĉe malpozitiva implicita nuanco, ĉar komune oni taksas lin la homo de la malengaĝiĝo kaj de malkuraĝeco.



“Ecce homo”, Pontio Pilato prezentas Jesuon al la homoj de Jerusalemo.

Pentraĵo de Antonio Ciseri (1821/1891).

Valoras la peno relegi la informofontojn, t.e. la kvar Evangeliojn kaj la aliajn malnovajn tradiciojn. El la Evangelioj jen la ĉapitroj kaj versikloj, kiuj parolas pri la romia provincestro, ekde la aresto de Jesuo ĝis lia krucumo: Mateo: 26,57-68; 27,1-2.11-66; Marko: 14,43-65; 15,1-46; Luko: 22,47-53.63-71; 23,1-25; Johano: 18,12-14.19-24.28-40; 19,1-42.

Pli atentan rigardon ni dediĉu al la tradicio.

Justino, filozofa kaj martiro, en la jaro 155 parolis pri la *Agoj de Pilato* kiel skribita verko, al kiu li donis apartan gravecon. En 197 Tertulianus asertis, ke pri la proceso kontraŭ Jesuo ekzistas en Romo oficialaj aktoj (aŭ oficiala raporto) senditaj al imperiestro Tiberius fare de la provincestro de Judujo; interalie Tertullianus notis, ke «la konscienco (de Pilato) estis fine ja kristana». Eŭsebio de Cezareo plendis, ke imperiestro Maksimino Daia en 311 disdonigis en la instruejoj falsajn rememorojn de Pilato “plenajn

je malpiaĵoj kontraŭ Kristo”, kaj ke li ordonis al la knaboj lerni ilin parkere, por instigi ilin al malamo kontraŭ kristanismo. Ankaŭ Epifanius, ĉ. 375, asertis, ke li baziĝas sur la *Agoj de Pilato* por datigi la feston de Pasko. Do, jam disvastiĝis *Agoj*, veraj aŭ malveraj, pri Pilato. Sed pri la “lavo de la manoj” de Pilato en tiuj tekstoj oni ne parolas. Ĝi estas rito, kiu certe ne estis elemento de la romia juĝa praktiko. La sola, kiu mencias ĝin, estas evangeliisto Mateo, pli atenta je la judaj leĝoj, kutimoj kaj moroj.

El kio inspiriĝis la evangeliisto pri ĉi tiu rito, certe ne romia, kaj kiu povis kompreni ĝian signifon? Ni ne forgesu, ke ĉi tiu Evangelio celis atingi hebreajn legantojn, kaj do ĝi pli atentis la judan leĝon ol la romian juron. En la biblia libro *Readmono* oni legas: «Se estos trovita mortigito sur la tero, kuŝanta sur la kampo, kaj oni ne scios, kiu lin mortigis, la plejaĝuloj el la urbo plej proksime de la mortigito prenu bovidinon, per kiu oni ne laboris kaj kiu ne portis jugon; kaj iru al valo kun fluanta akvo, kaj ili mortigu ĝin kaj diru: “Niaj manoj ne verŝis ĉi tiun sangon, kaj niaj okuloj ne vidis. Pekliberigu Vian popolon Izrael... ne kalkulu sangon senkulpan inter Via popolo Izrael!”» (kp Rea 21,1-8). Ĝi estas esprimo, kiun ni legas nur en tiu ĉi paĝo de la Malnova Testamento, al kiu evidente rilatas Mateo.



Duccio di Buoninsegna (ĉ. 1255/ĉ. 1318): Kristo fronte al Anas.

Kongrue kun ĉi tiu simbolado, oni komprenas la eldirojn: «Mi estas senkulpa pri la sango de...»

(kp Dan 13,45); «Mi lavas miajn manojn per senkulpeco...» (Psa 26,6). Ĝi estis la plej solena, publika, oficiala rito por atesti sian senkulpecon. Pilato ĝin faris ne fronte al siaj soldatoj, sed, laŭ la preskribo de la juda leĝo, fronte al la popolo aŭ al la pastroj, kiel diras Mateo. Kaj la popolo respondas: «Lia sango estu sur ni kaj sur niaj infanoj» (Mat 27,25), frazo, kiu korespondas al la eldiroj: «Via sango estu sur via kapo...» (2Sam 1,16); «Sciu, ke se vi min mortigos, vi ŝarĝos per senkulpa sango vin...» (Jer 26,15). Oni do komprenas entute la plenan signifon de la rito atribuita al Pilato.


Ekzistas plie valora teksto. En la *Evangelio laŭ Petro* – malkovrita nur en 1886, sed datita ĉirkaŭ la jaroj 90-100, kaj sekve, la plej malnova ne kanona teksto pri la Pasiono – oni legas frazojn, ŝajne kuriozajn: «Neniu el la Judoj lavis siajn manojn, — nek Herodo, nek unu el liaj juĝistoj; kaj kiam neniu el ili deziris lavi sin, Pilato ekstaris...». Bedaŭrinde la teksto ne estas kompleta, sed aspektas evidente, ke la romia provincestro igis sia la geston priskribitan de la evangeliisto.

Ĝis ĉi tie ni revuis tion, kio troveblas en la bibliaj tekstoj pri la historio de Pilato-juĝisto de Jesuo kaj pri lia rolo en la pasiono kaj morto de la Nazaretano. Sed multe pliaj estas la dokumentoj – kelkaj tre malnovaj, aliaj malpli – kiuj priskribas la samajn temojn. En la Ambrozia biblioteko de Milano (Italio), samkiel en multaj eŭropaj bibliotekoj, estas konservata rimarkinda nombro da manuskriptoj (en la greka, latina, kopta, etiopia, araba). Ĉi tiun abundon klarigas, almenaŭ parte, la fakto, ke estis periodo kiam oni legis kelkajn el tiuj tekstoj dum la liturgio. Foje estas sufiĉe malfacile distingi la tekstojn kun historia bazo disde tiuj sufiĉe nekredindaj; ĝenerale, indas ne doni definitivitan pritakson.

Por doni unuan ideon pri la kvanto kaj varieco de la materialo, kiu transdoniĝis pri la Pasiono de Jesuo, ni listigas tiujn, al kiuj oni atribuas apartan valoron, ĉu pro ilia malnoveco ĉu pro ilia enhavo: *Evangelio laŭ Nikodemo* (malsupreniro al la infero); Ciklo de Pilato (korespondado inter Pilato kaj Herodo): *Leteroj inter Pilato kaj Tiberius*, *Anaforo de Pilato*, *Aresto de Pilato*, *Morto de Pilato*, *kiu kondamnis Jesuon*, *Resaniĝo de Tiberius*, *Venĝo de la Savanto*; *Evangelio*

laŭ Gamalielo; *Deklaro de Jozefo de Arimateo*; *Evangelio laŭ Nikodemo*.

Ĉi tiuj verkoj ĝenerale havas tri komunajn punktojn: Pilato ĉiam asertis la senkulpecon de Jesuo kaj estis devigata (pro la socia situacio en Judujo) ratifi la kondamnon pro la insistado de la judaj aŭtoritatoj; li ne samopiniis kun iliaj juĝoj; li estis profunde tuŝita de la personeco de Jesuo kaj de tio, kio okazis ĉirkaŭ Li.



Fresko "Kriso fronte al Kajafas" de Giotto (ĉ. 1267/1337)

Kvankam malfacilas aŭdaci ĝeneralajn pritaksojn, kiam la manuskriptoj estas tiom multaj kaj tiom diversaj inter si, tamen ni klopodu resumi: la okcidentaj tekstoj elmontras sufiĉe da obstina atako kontraŭ Pilato kaj foje ili priskribas lian perfortan morton (en malliberejo, en kavernoj, murdita de sago), konsumita de malpaco kaj subpremata de diablaj komplotoj; laŭ unu el la tekstoj, Pilato memmortigis sin kaj lia maltrankvila spirito estis devigata vagadi el Romo al Svislando.

La okcidentaj tekstoj volas savi la centran aŭtoritaton de la romia juro, kaj ili subtaksis, kaj foje miskomprenis, la raportojn de la Evangelioj. Male, laŭ ĉiuj orientaj tekstoj Pilato estis sanktulo: la resurektinta Jesuo favoris lin per unu el siaj unuaj aperoj. ■

Luigi Moraldi (el la itala tradukis cs)

Prof-ro Moraldi (1915–2001) estis eminenta itala filologo. Ĉi tiu artikolo aperis en 1999.

“NUR SENFINA MIZERIKORDO POVAS DONI AL NI LA SAVON”

Paska Mesaĝo de la Papo 2016, Placo Sankta Petro, 27.3.2016

En sia paska mesaĝo, Papo Francisko, post la ĉefcelebro de la sankta Meso kaj antaŭ la beno *Urbi et Orbi*, memorigis la vundojn de la mondo, plena je personoj, kiuj suferas korpe kaj spirite. Francisko ankaŭ parolis pri la tragedio de “mal-humanaj krimoj, kiuj ne malofte okazas en la



hejmaj muroj” kaj pri la tragedio de “vastskalaj armitaj konfliktoj, kiuj submetas tutajn loĝantarojn je neeldireblaj elprovoj”. La penso de la Papo iris aparte al la loĝantaroj de la landoj martirigitaj de militoj, al la viktimoj de terorismo kaj al la migrantoj.

“Jesuo Kristo resurektis. La amo – skribis krome Francisko en la tŭitera mesaĝo en la tago de Pasko – venkis la malamon, la vivo venkis la morton, la lumo subtretis la mallumon!”.

Nur Dio, per sia eterna mizerikordo, povas plenigi “la spiritajn kaj moralajn abismojn de la homaro”, la malplenojn en la koroj, kiuj estigas malamon kaj morton. Jesuo, krucumita kaj resurektinta – diris la Papo – donas al ni sian rigardon de tenereco kaj kompato rilate al la malsatantoj kaj soifantoj, la fremduloj kaj la enkarcerigitoj, la marĝenigitoj kaj la forapartigitoj, la viktimoj de maljusteco kaj perforto.

Jesuo estas nia espero: “Jesuo resurektinta indikas padojn de espero al la kara Sirio, lando disŝirita de longa konflikto, kun sia malfeliĉa serio de detruo, morto, malŝato de la humaneca rajto kaj ruiniĝo de la civila kunvivado. Al la potenco de la resurektinta Sinjoro ni konfidu la okazantajn interparolojn, por ke per bona volo kaj ĉies kunlaboro, oni povu kolekti fruktojn de paco kaj startigi la konstruon de frata socio, respektema pri la digno kaj rajtoj de ĉiu civitano”.

“Ke la mesaĝo de vivo, kiu reĉhis el la buŝo

de la anĝelo ĉe la renversita ŝtono de la tombo – aldonis Francisko – venku la malmolecon de la koroj kaj akcelu fruktodonan renkonton de popoloj kaj kulturoj en aliaj regionoj de la mediteranea baseno kaj de Proksima Oriento, aparte en Irako, Jemeno kaj Libio”.

La penso de la Papo iris poste al la lando de Jesuo. “La bildo de la nova homo, kiu brilegas sur la vizaĝo de Kristo, akcelu en la Sankta Lando la kunvivadon inter israelanoj kaj palestinoj, samkiel la paciencon memdisponon kaj ĉiutagan sindevigon klopodi por konstrui la bazojn de justa kaj daŭra paco pere de rekta kaj sincera intertraktado”.

La Papo esprimis sian deziron ankaŭ por alia lando disŝirita de perfortaĵoj: “Ke la Sinjoro de la vivo akompanu ankaŭ la klopodojn, kiuj celas atingi definitivan solvon por la milito en Ukrainio, inspirante kaj subtenante ankaŭ la iniciatojn de humanecaj helpoj, inter kiuj la liberigo de enkarcerigitaj personoj”.

Francisko poste memorigis la viktimojn de terorismo: “La Sinjoro Jesuo, nia paco, kiu, resu-



rektante venkis malbonon kaj pekadon, stimulu dum ĉi tiu paska festo nian proksimecon al la viktimoj de terorismo, blinda kaj kruela formo de perforto, kiu ne ĉesas disverŝi senkulpan sango en diversaj mondopartoj, kiel okazis dum la ĵusdataj atencoj en Belgio, Turkio, Niĝerio, Ĉadlando, Kamerunio kaj Eburaj Bordo”.

“Ne mankas – substrekis Papo Francisko – fermentiloj de espero por la perspektivoj de paco en Afriko: “Mi pensas aparte al Burundo, Mozambiko, Demokratia Respubliko Kongo kaj Sud-Sudano, markitaj de politikaj kaj sociaj streĉiĝoj”.

“Jesuo – diris la Papo – estas la pordo de la

mizerikordo malfermegata por ĉiuj. Ke lia paska mesaĝo pli kaj pli projekciĝu sur la venezuela popolo, en malfacilaj kondiĉoj, en kiuj ĝi troviĝas, kaj sur tiuj, kiuj havas en siaj manoj la destinon de la lando, por ke oni povu labori antaŭvide al la komuna bono, serĉante spacojn de dialogo kaj kunlaboro kun ĉiuj”.

“La anonco de la resurektinta Kristo – daŭrigis la Papo – nin invitas ankaŭ ne forgesi migrantojn kaj rifuĝintojn, inter kiuj estas multaj infanoj, kiuj fuĝas el milito, el malsato, el malriĉeco kaj socia maljusteco. Ĉi tiuj niaj fratoj kaj fratinoj, laŭ la vojo renkontas tro ofte la morton aŭ ĉielajn la rifuzon de tiuj, kiuj povus proponi al ili akcepton kaj helpon. Ke la rendezuo de la venonta monda humaneca pinta renkonto ne preterlasu meti je la centro la homan personon kun ties digno kaj prilabori politikojn, kiuj estu kapablaj asisti kaj protekti la viktimojn de konfliktoj kaj de aliaj urĝaj situacioj, ĉefe la pli vundeblajn, kaj tiujn, kiuj estas persekutataj pro etnaj kaj religiaj motivoj”.

“En ĉi tiu glorplena tago – substrekis poste la Papo – ĝoju la tero riĉa je brilego, sed multe mistraktata de ekspluatado, avida je profito, kiu

aliigas la ekvilibrojn de la naturo”. “Mi aparte pensas al tiuj areoj trafitaj de la efikoj de klimataj ŝanĝiĝoj, kiuj ne malofte estigas sekecon aŭ perfortajn inundojn kun konsekvencaj nutradaj krizoj en diversaj partoj de la planedo”.

Papo Francisko, sekve, instigis reaŭskulti kun la fratoj kaj fratinoj, kiuj estas persekutataj pro sia kredo kaj pro sia fideleco je la nomo de Kristo, kaj fronte al la malbono, kiu ŝajnas venki en la vivo de multaj personoj, la konsolodonan vorton de la Sinjoro: “Ne timu! Mi venkis la mondon!”. “La mesaĝo de Jesuo – diris fine la Papo – helpu ĉiun el ni restari kun plia kuraĝo, por konstrui vojojn de repaciĝo kun Dio kaj kun la gefratoj. Al tiuj, kiuj en niaj socioj perdis ĉiun esperon kaj la guston vivi, al la deprimitaj maljunuloj, kiuj en soleco sentas malaperi la fortojn, al la gejunuloj, al kiuj ŝajnas manki la estonteco, al ĉiuj mi adresas ankoraŭfoje la vortojn de la Resurektinto: ‘Jen mi faras novaj ĉiujn aferojn... Al la soifanto mi donos senpage la akvon el la fonto de la vivo’. Ĉi tiu trankviliga mesaĝo de Jesuo helpu ĉiun el ni restari kun plia kuraĝo kaj plia espero, por konstrui vojojn de repaciĝo kun Dio kaj kun la gefratoj. Ni multe bezonas tion”. ■

«ANKAŬ MI SONĜAS EN ESPERANTO....»



Papo tiam diris: “Mi sonĝas en Esperanto”, v. EK 1-3/2016, p. 8). Fronte al la eldiro de d-ro De Salvo, la Papo videble gajigiĝis kaj kun ridetanta mieno diris: «Ĝi plaĉis al vi, ĉu?». Tiam d-ro De Salvo aldonis: «Mi estas la prezidanto de la katolikaj esperantistoj»: verdire li “estis” tia, sed kompreneble li volis pli rekte imponi. La Papo, laŭ la atesto de d-ro De Salvo, eĉ pli gajigiĝis, kiel cetere pruvas la du fotografioj, la unua komence, la dua fine de la interparolo, okazinta en la itala lingvo. ■

Inter la partoprenantoj en la taga Meso celebriĝinta la 21-an de Aprilo de Papo Francisko en domo sankta Marta en Vatikano estis interalie d-ro Antonio De Salvo, iama Prezidanto de IKUE. Post la Meso, la Papo salutis unuope la ĉeestantojn. Kiam estis lia vico, d-ro De Salvo diris: «Sankta Patro, ankaŭ mi sonĝas en Esperanto!». (La eldiro kunligiĝis kun la respondo al insida demando de la ĵurnalistoj, kiun Papo Francisko donis dum flugreveno el Meksiko: “Ĉu vi sonĝas en la hispana aŭ en la itala?”. La



LA KVAR BIBLIAJ TAGOJ EN BAIA MARE (Rumanio)

Ĉi-jare la kvar Bibliaj Tagoj, organizitaj de Stefan Lepping, okazis de la 6a ĝis la 10a de Aprilo en Baia Mare, granda urbo en la nord-orienta parto de Rumanio. Kunlaboris por la organizo ankaŭ Maria Laszlo, rumana, delonge aktiva esperanta agantino kaj ofta vizitantino de niaj kongresoj, ŝia fratino Maria Tereza kaj ŝia nepino Helga, universitata studentino. Dum niaj ekskursoj ĉiĉeronis ankaŭ la rumana Gabriella Stier-Fischer.

Partoprenis la kunvenon dek kvin esperantistoj alvenintaj el Germanio, Italio, Ĉeĥa Respubliko, Slovakio kaj, kompreneble, Rumanio, iuj el ili katolikoj, aliaj luteranoj kaj ortodoksuloj. Oni tranoktis kaj manĝis en hotelo Roxana



Hotelo Roxana Imperial

Imperial, kiu distancas dek minutojn da piediro el la renkontiĝejo: la katolika preĝejo en kiu okazis la religiaj ritoj kaj kantoj, dum la prelegoj kaj matenmanĝoj okazis en ĝia paroĥa domo.

Tie la jam alvenintaj geamikoj tre varme akceptis nin. Ni kune vespermanĝis sidante ĉirkaŭ ronda tablo: "13 manĝantoj kiel la apostoloj kun Jesuo", iu amuze rimarkis.

Ĵaŭdon, la 7an, post la Rozario, la Meso kaj la matenmanĝo, ekis oficiale la kunveno. La benediktana patro Willibald prelegis pri la unua parto de la libro de la profeto Jesaja. Ĝi estas la plej pesimisma parto, en kiu oni rakontas pri popolo, kiu ne volas konvertiĝi, kaj eĉ ne aŭskultante la admonon de la profeto, ĝi sin montras pli kaj pli obstina en sia kon-

duto. La posttagmezon ni vizitis la urbon, parte per buso, parte per promenado. La gvidantinoj Maria Laszlo kaj Gabriella Stier-Fischer priskribis placojn, preĝejojn, palacojn kaj iliajn historiojn.



Pastro Willibald Kunigk kaj pastoro Wolfram Rohloff

Vendredon la okan, la mateno disvolviĝis kiel la antaŭa tago. Patro Willibald daŭrigis sian prelegon parolante pri la dua parto de la libro de Jesaja: la ekziligado al Babelo, urbo komparata al kompleta forhakiĝo de arbo, tial ke el ĝi restas nur la trunko. Por tiuj, kiuj amas sian popolon kaj sian religion, tiu estas senespera situacio. Poste la juna luterana pastoro Wolfram Rohloff



prelegis pri la sama temo, sed prezentante ĝin alimaniere. Posttagmeze, post ĉirkaŭ du horoj de perbusa vojaĝo, ni alvenis al Bârsana por viziti



Ortodoksa monaĥinejo Bârsana

la rekonstruitan ortodoksan monaĥinejon. Dum la reveno ni vizitis preĝejon el ligno, proklamitan “havaĵo de Unesko”. Sabaton la 9an, patro Willibald finis sian prelegon pri la tria parto de la libro de Jesaja. Post tiom longa foresto de la juda popolo kaj de la kulto, okazis ia “resurekto”: la persa reĝo Ciro supervenkis Babelon kaj ordonis al la judoj reiri al sia lando, rekonstrui la templon en Jerusalemo kaj repreni la kulton al unu Dio de Israelo. Rigardante la promesojn de vera daŭra feliĉo kiel sekvo de sincera reveno al Dio, oni komprenas, ke ne temas nur pri politika situacio de la tiamaj tempoj, sed temas pri la sama nuntempa historio, ĉar la feliĉo ne estas nur en la mondo, sed ĝi trapasas la limojn atingante la eternan savon. Pri tio eĉ ludas la kantikoj de la Servanto de Dio en la Nova Testamento.



Ligna ortodoksa preĝejo

Posttagmeze de vendredo la ortodoksa pastro invitis nin viziti lian preĝejon. Poste ni iris al lia paroĥa domo, kie atendis nin agrabla regalado. Kvar paroĥaninoj kantis rumanajn kantojn, je

kvar voĉoj, sen muzika akompano. Ili klarigis al ni la kialon: “La homa voĉo estas donaco de Dio, la muzika instrumento estas farita de homoj”. Poste ni iris al la Stefana Turo, nura restaĵo de la antikva paroĥa preĝejo en Baia Mare. Ĝi suferis siatempo plurajn ŝanĝiĝojn kaŭze de daŭraj disputoj inter malsamaj konfesioj. Nun la turo estas utiligata kiel ekumena kapelo. Ĉi-tie la luterana pastoro Wolfram celebris la diservon kun la Sankta Manĝo. Poste ni iris al la katolika preĝejo, kie triopo de junaj muzikistoj proponis al ni koncerton, per pianolo kaj klarionoj, ludante muzikon de Chopin. Post la vespermanĝo nia grupo disiĝis: iuj restis ĉetabla por konversacii, aliaj retiriĝis por pretigi la morgaŭan vojaĝon. La plej junaj malsupreniris al suba diskoteko por resti ĝis la tria matene.



Romkatolika preĝejo de la Sankta Triunuo

Dimanĉon la 10an okazis la fermo de la kunveno kaj la sekva komuna adiaŭa Diservo. Ĉiu el ni kunportis en la okuloj kaj en la koro la bildojn de la belega Rumanio, de ĝia verda montaro kovrita de arbaroj, de ĝiaj ĝardenoj kun multkoloraj floroj, de la gaja, sincera rideto de ĝiaj loĝantoj. ■

*Norma Cescotti (el Katolika Sento, kun resumoj)
Fotoj de Gabriella Stier kaj Oldřich A. Fischer*

NITRA – LA PATRINO DE LA SLOVAKAJ URBOJ

Daŭrigo al la unua parto aperinta en EK 1-3/2016

Ĉirkaŭ la jaro 833 la princlando de Nitra estis trudaneksita de reĝo Mojmir la unua al princlando de Moravio estigante novan ŝtaton: la



Kastelo de Nitra el la jaro 1690

Granda Moravio. La frankoj invadis Moravion en la mezo de Aŭgusto 846 trovante malgrandan reziston. Ili detronigis Mojmir kaj elektis lian parencon Rastislav (estonta sanktulo de la ĉeĥa kaj slovakaj ortodoksa Eklezio) kiel sian vasalan reganton de Moravio. Lia periodo estas kunligita kun grava evento: la alveno de la bizancaj misiistoj Cirilo kaj Metodo en la jaro 863, senditaj de la Eklezio de Konstantinopolo, post la peto de Rastislav ricevi misiistojn.

Cirilo prilaboris la unuan slavan alfabeton, kiun oni nomis “Glagolico”. Li ankaŭ tradukis la unuajn liturgiajn tekstojn en la slavan lingvon; Metodo, kiun Papo Hadriano la 2-a konsekris episkopo en la jaro 870 kaj poste ĉefepiskopo, fariĝis papa sendito por la slavoĵoj de Panonio kaj de Alta Danubo.

Post la morto de sankta Cirilo, Metodo revenis al Moravio, kie li eksciis, ke princo Rastislav pro la komploto de lia nevo Svatopluk estis detronigita, fortrenita fremdlanden kaj blindigita. Metodo mem estis poste kaptita, proklamita eks-pastro kaj kondamnita al karcero. La samo okazis al liaj lernantoj. Post du jaroj da enkarcerigo li estis liberigita kaj li daŭrigis sian misiadon en Moravio kun granda sukceso: la nombro de slavaj pastroj kreskis kaj la popolo pro konvinkigo, ne pro devigo, forlasis paganismon.

Nitra ĝuis “oran epokon” dum la regado de reĝo Svatopluk. En unu el la dokumentoj pli valoraj por la slovakaj historio – la letero de Papo Johano la 8-a al Svatopluk datita en la jaro 880

kaj titolita “*Industriae tuae*” – Svatopluk estas alparolata kiel reĝo kaj la Papo informas lin, ke Viĥing estis nomumita episkopo de Nitra, kiu, probable ekde tiam fariĝis urba komunumo, kun 5 remparburgoj, kie 20 komunumoj de lertaj metiistoj laboris kaj komercadis.

Ĝis la komenco de la 14-a jarcento Nitra restis la rezida urbo de la princlando landlime de la intertempe formita hungara monarkio. Plie, dum la mezepoko ĝi estis loko de gravaj historiaj okazaĵoj kaj ĝin ofte rabis diversaj armeoj. La benediktanoj prenis la organizadon de la eklezia vivo: ilia monaĥejo de sankta Hipolito sur la deklivo de monteto Zobor estis la unua starigita en Slovakio.

En la jaro 1248 reĝo Béla la 4-a, kiel signo de ŝato por la protekto kontraŭ Tataroj, levis Nitra-n ĝis la rango de libera reĝa urbo kun privilegioj similaj al tiuj de Székesfehérvár en Hungario.

La mezepokan Nitra-n oni dividis inter Alta kaj Malalta Urbo, ambaŭ dividitaj en pliajn partojn, ĉiu kun sia skabeno kaj propraj sigeloj. Kvar novaj sendependaj paroĥoj estiĝis ĉirkaŭ la preĝejoj de sankta Mikaelo en placo Na vřšku, sankta Jakobo en la ĉefplaco, sankta Stefano en Parovce kaj de la Dipatrino sur la kalvaria monteto.



Statuo de princo Pribina

En la jaro 1663 Nitra estis konkerita de la Otomanoj. La turka regado daŭris nur dum dudeko da jaroj ĝis la liberigo fare de la armeo de la aŭstria Imperio en la jaro 1685.

Ekde la dua duono de la 18-a jarcento Nitra ĝuis pacajn jarojn kaj ĉar la Alta Urbo kaj la Kastelo estis bone protektitaj, oni povis startigi la renovigon de la urbo kaj ŝanĝojn de la Kastelo kaj de la Katedralo kun la samtempa konstruo

de pluraj elegantaj konstruaĵoj, kiujn oni povas vidi ankoraŭ hodiaŭ. Rezulte de la urba evoluo la nombro da loĝantoj kreskis superante 10.000 en la 19-a jarcento. En la jaro 1873 Nitra fariĝis komunumo kun urbestro kaj pluraj konsilianoj.



Nitra - monteto Zobor

La urbo estis ankaŭ koncernata de la kontraŭ-habsburgaj ribeloj, ekde tiuj de István Bocskai kaj Gábor Bethlen en la 17-a jarcento ĝis tiuj de Kuruc de la jaro 1703 ĝis la jaro 1711, kaj, inter iliaj postsekvoj, estis la bruligo de la urbo en la jaro 1708. Ĝi estis renovigita en la 18-a jarcento laŭ la baroka stilo. Kiel konsekvenco de la revo-lucioj de la jaro 1848 Nitra ricevis sendependan aŭtonomion por la unua fojo ekde la jaro 1288 kaj iĝis sendependa de la diocezo de Nitra kaj de ĝiaj episkopoj. Restante ankoraŭ urbeto de terkultivistoj kaj metiistoj Nitra komencis industriiĝi. Ĝis la unua mondmilito estis starigitaj distilejoj, fabriko de agrikulturaj maŝinoj, bierfarejo, laktaj-fabriko kaj aliaj industrioj. La unua nerekta ligo al fervojo estis la strato konstruita en la jaro 1850 ĝis la plej proksima stacidomo en Trnovec nad Váhom. La fervojo finfine alvenis al Nitra en la jaro 1876, kiam oni starigis kunligon ĝis Šurany; pliaj linioj estis konstruitaj al Topoľčany, Hlohovec kaj Nové Zámky. Kadre de la “hungarigo” de la regiono, ekde la jaro 1883 ĝis la jaro 1919 en Nitra estis la sidejo de la Alta Hungara Instru-Asocio (Femke), asocio sponsorita de la registaro kun la ĉefa celo apliki al slovakoj la hungarajn politikojn.

Post la unua mondmilito kaj la disfalo de Aŭstrio-Hungario la ĉeĥoslovakaj trupoj okupaciis la urbon ekde la 10-a de Decembro 1918 por plifirmigi la rolon de la lastatempe kreita Ĉeĥoslovakio. Nitra daŭre estis la sidejo de la Nitra distrikto ĝis ĝia dissolvo en la jaro 1928. Post disrompo de Ĉeĥoslovakio en la jaro 1939

Nitra iĝis parto de la unua Slovaka Respubliko kaj refoje centro de la distrikto de Nitra ĝis la jaro 1945. La periodo de la unua Slovaka Respubliko estis tragika por la multnombra juda loĝantaro de Nitra, kiu unue estis turmentata de la kontraŭ-juda leĝaro kaj poste plejparte ekstermita en la germanaj koncentrejoj. La resto de judoj fuĝis el la urbo kaj el la lando. La urbo estis liberigita de la sovetia Ruĝa Armeo en la jaro 1945 kaj sekvis nur tri jaroj de restarigita demokratio en Ĉeĥoslovakio. La komunista periodo de la jaro 1948 ĝis la jaro 1989 estis markita de subpremoj kontraŭ la katolika Eklezio, kiu havas tradicie fortan ĉeeston en Nitra. Katolikaj seminarioj, monaĥejoj kaj aliaj posedaĵoj estis ŝtatigitaj kaj transformitaj al muzeoj, lernejoj kaj oficejoj. Dum tiu periodo la urbo spertis vastan kreskon pro la rekonstruo de loĝejoj kaj unuigo de antaŭe sendependaj vilaĝoj. Post la Velura revolucio de la jaro 1989 kaj la dissolvo de Ĉeĥoslovakio, Nitra iĝis parto de la nova Slovakio kaj iĝis sidejo de regiono Nitra en la jaro 1996.

Ĝemeligitaj urboj

Interese estas, ke Nitra estas ĝemeligita kun urboj, kiuj havas signifon por nia movado, ĉar tie naskiĝis esperantistoj aŭ ili gastigis E-aranĝojn inkluzive tiujn de IKUE: České Budějovice kaj Kroměříž en Ĉeĥio; Osijek en Kroatio; Zoetermeer en Nederlando; Zielona Góra en Pollando; Spišská Nová Ves en Slovakio.

LA VIDINDAĴOJ EN NITRA

Nitra havas riĉecon de historiaj strukturoj kaj de natura beleco en sia medio. La plej bone konataj punktoj de intereso estas la Kastelo (Hrad), la Malnova Urbo (Staré Mesto) kaj la apuda monteto Zobor, kiu alrigardas la urbon.

Rimarkindaj religiaj lokoj en Nitra estas la Katedralo de sankta Emmeram en la Kastelo, la piarista preĝejo de sankta Ladislao kaj la apuda monaĥejo. La plej malnova preĝejo de la urbo estas tiu de sankta Stefano, kiu estis konstruita inter la 11-a kaj la 12-a jarcentoj, kvankam ĝiaj fundamentoj datiĝas de la 9-a jarcento.

La preĝejo, la klostro kaj la monaĥejo de la piaristoj en strato Piaristická, ĉe la eniro al la Malalta Urbo alvenante el Bratislavo, estas rimarkinda baroka domaro kun du sonorilturoj. La tuto estis fondita en la 13-a/14-a jarcentoj. Ĝia preĝejo de sankta Ladislao estis detruita de brulego kaj restarigita en 1742/1748 laŭ baroka stilo. Interne estas dekoraĵoj el tre intensa rokoka stilo kaj impona altaro kun stukajoj kaj marmoroj:

la statuoj estas de sanktaj Stefano kaj Ladislao la unua de Hungario. La interno estis renovigita en 1940 kaj estis aldonitaj tri modernaj freskoj, kiuj prezentas temojn el la slovakia historio de Nitra.

La Malnovan Urbon superrigardas la Kastelo, kiu estas unu el la plej interesaj malnovaj domoj en Slovakio. Arkeologiaj trovitaĵoj de la pasintaj jardekoj indikas, ke granda fortikigita kastelo jam staris tie je la epoko de Imperio Samo, en la 7-a jarcento. Lastaj arkeologiaĵoj pravas la ekziston de preĝejo el la 9-a jarcento sub la pli nova gotika Katedralo de sankta Emmeram. La konstruo de la ŝtona Kastelo komenciĝis dum la 9-a jarcento, kiam regis Svatopluk, princo de Nitra. La Kastelo nuntempe konsistas el kelkaj fortikaĵoj, kiel turo Vazal, la Katedralo kaj la katolika episkopejo, la unua en Slovakio, ĉar ĝi estis fondita en la jaro 880 kiel diocezo por la okcidentaj kaj orientaj slavoĵoj kaj ĝi ekzistas ekde tiam, kun la nura interrompo en la 10-a jarcento ĝis ĉirkaŭ la jaro 1110.

La Katedralo de sankta Emmeram konsistas el 3 surmetitaj elementoj. La du supraj partoj estas el baroka stilo kun multegaj plurkoloraj marmoroj. En la centra parto, dekstre, estas marmora ĉefaltaro de la jaro 1662 kun la bildo de la Dekrucigo de Kristo. Eblas viziti la plej malnovan parton de la Katedralo: la restaĵoj de baziliko de la 12-a jarcento kun belegaj relikvujoj kaj sigelo.

Ekster la Katedralo, alrigardante la ebenaĵon, oni vidos, iom fora, la etan preĝejon de Nitra-Drážovce, starigita sur la pinto de monteto dekstre. Ĝi estas rimarkinda ekzemplo pri la frua romanika arkitekturo.



La Sinagogo Neolog (unu el la branĉoj de la hebrea reformo, disvastiĝinta ĝis la fino de la dua mondmilito ĉe la hungarlingvaj komunumoj) estis konstruita en 1908/1911: ĝin desegnis la budapeŝta Lipót (Leopold) Baumhorn (1860-1932), la multverka arkitekto de sinagogoĵoj (da ili li konstruis aŭ projektis preskaŭ 24 en la tuta

Aŭstri-hungara Imperio, inkluzive de la nova sinagogo de Szeged). Lokita en mallarĝa strato, la konstruaĵo estas karakteriza ekzemplo de la stilo de Baumhorn: kun sia miksaĵo de elementoj maŭraj, bizancaj kaj de Art Nouveau (nova arto, en la franca, kiu karakterizis la periodon inter 1890 kaj la unua mondmilito) la sinagogo alrigardas la straton kun fasado kaj du turoj; ĝin konsistigas salono kun la kupolo subtenitaj de kvar pilastroj, kiuj tenas ankaŭ la matronan galerion (tio estas, la spaco por la virinoj). Post pli ol jardeko da zorgema rebonigo fare de la komunumo de Nitra, la domon oni nun uzas kiel centron por kulturaj agadoj. La porvirina galerio gastigas “La destino de la slovakaj hebreoj” – nacian memorig-ekspozicion pri la holokaŭsto. Plie, en la sinagogo estas konstanta ekspozicio de la grafikaj verkoj de la israela artisto, naskita en Nitra, Shraga Weil (1918-2009).

La Kalvario: iom for, sur la altaĵoj, staras la kapelo de la sankta Kruco. Oni povas atingi ĝin piede laŭlonge de la krucovojo aŭ golgota vojo kun 14 kapeletoj. Piede de la monteto estas la preĝejo de sankta Maria, konstruita en la jaro 1765 por hispana ordeno. Ĉi-lasta prizorgis la preĝejon kaj la pilgrimantojn; poste la konstruaĵo funkciis kiel orfeĵo. En la jaroj 1878/85 ĝi estis rekonstruita laŭ la nov-romanika stilo kaj en la jaro 1925 estis aldonita plia etaĝo. La konstruaĵo, kiel ni vidas ĝin hodiaŭ, estis verko de la slovak arkitekto M. M. Harminec. Nuntempe la tuta konstruaĵo estas misio-domo de la societo de Dia Vorto kaj en ĝi estas ankaŭ la misiista muzeo pri popoloj kaj kulturoj.

La Muzeo (Nitrianské múzeum) estas malgranda, sed entenas trezorojn. Dediĉita al la regiona historio, en ĝi estas multaj arkeologiaj trovitaĵoj de Slovakio: malnovega monero trovita en la regiono de Orava; tranĉilo malkovrita en la Danuba regiono, kelkaj belegaj bizancaj eburaj statuetoj de la 4-a jarcento kaj, ĉefe, la fama Virgulino de Moravany, skulptita en ostoj de mamuto, longa kelkajn centimetrojn, sen brakoj

nek kruroj.

Fine meritas viziton la urba Teatro en la ĉefa strato (Štúrova ulica), dekstre alvenante el Bratislavo; ĝi estas domo el okra koloro ĉirkaŭita de unuetaĝaj burĝaj loĝejoj. ■

*Carlo Sarandrea
kun la reviziado de Pavol Petrík*

La 29-an de Aprilo la Eklezio festas Caterina Benincasa (1347-1380), konata kiel Katarina el Sieno, proklamita de la katolika Eklezio Sanktulino (1461), kunpatronino de Romo (1866), kunpatronino de Italio (1939), doktorino de la Eklezio (1970), kunpatronino de Eŭropo (1999).

SANKTA KATARINA EL SIENO

Arda amo al Kristo kaj al la Eklezio

Katarina aliĝis junega (16-jara), tamen restante laikino, al la dominikanaj monaĥinoj, sindediĉaj al la asisto al la malsanuloj kaj al la malriĉuloj. Ĉar ŝi scipovis nek legi nek skribi (ŝi lernis skribi nur tri jarojn antaŭ sia morto), kaj estis malklera, ŝi penadis, por sekvi la komunan preĝadon kaj la Meson, kiuj disvolviĝis latine, kaj pri kiuj ŝi komprenis nenion.



Kvankam ŝi estis praktike analfabeta, ŝi postlasis 382 leterojn, kiujn ŝi diktis al aliaj, adresitajn ankaŭ al gravuloj, alfrontante rezolute temojn kaj problemojn religiajn, moralajn, socialajn kaj politikajn, tiom, ke interne de la dominikana ordeno, ŝi estis akuzita pri parademo kaj viziemo, kaj eĉ suspektata pri herezo, ĉar ŝia sinteno estis tute ekster ĉia tradicia skemo, ne kutima tiuepoke ĉe virino, des pli juna, popola kaj malklera, kiu

permesis al si skribi fajrajn leterojn al altrangaj personoj; pro tio oni altrudis al ŝi personan konfesprenanton, fraton Raimondon el Kapuo, kun la tasko ŝin gvidi, sed ankaŭ ŝin bridi.



Aparte famkonata estas ŝia letero 206, skribita en 1367, kiam ŝi havis nemulte pli ol 20 jarojn al Papo Gregoro la 11-a, por inviti lin reveni al Romo de Avinjono, kaj precipe liberigi la Eklezion el la korupto, renovigante la spiriton de la Evangelio.

En la lastaj dek jaroj de sia mallonga vivo (ŝi mortis je 33 jaroj) ŝi skribis kun saĝo, maltimo kaj persistemo al la potenculoj de la tero tiel, ke al ŝi estas rekonita “profeteca spirito”, kvazaŭ akravida kaj forta gvidantino de la kristana popolo; jen kial ŝi estis proklamita “doktorino de la Eklezio” kaj “kunpatronino de Eŭropo”, kvankam virino kaj malklera.

Ŝi mortis en Romo (ŝi estas kunpatronino de tiu urbo ankaŭ pro tio, ke ŝi revenigis la Papojn), elĉerpita de fastoj – en la lasta monato ŝi sindetenis ankaŭ de trinkado. La pliparto el ŝia korpo troviĝas en la dominikana baziliko de Sankta Maria ĉe Minervo, la ununura roma preĝejo laŭ originala gotika stilo, dum partaj relikvoj estas dissemataj en pluraj urboj: la kapo kaj unu fingro en Sieno, en la baziliko de Sankta Dominiko; splito el skapolo en Sieno, en la sanktejo de la Sanktulino; la maldekstra piedo en Venecio, en

la preĝejo de Sanktaj Johano kaj Paŭlo; unu ripo en la katarinana sanktejo de Astenet en Belgio, en trilingva landoparto (flandra, franca kaj germana), krucvojo de Eŭropo; la maldekstra mano, kun la postsigno de stigmatoj, en Romo en la monaĥinejo de la dominikanaj monaĥinoj de Sankta Rozario ĉe Monto Marjo. (ads)



**“Venu, patro, kaj ne plu atendigu
la servistojn de Dio”**

**Letero de sankta Katarina al
Papo Gregoro la 11-a**

Je la nomo de Jesuo Kristo krucumita kaj de la dolĉa Maria. Tre sankta kaj kara kaj dolĉa patro en Kristo dolĉa Jesuo, mi, via neinda filino Caterina, servistino kaj sklavino de la servistoj de Jesuo Kristo, skribas al vi je nomo de lia alte valora sango kun la deziro vidi en vi la plenecon de la dia graco; tiamaniere, ke vi estu ilo kaj kaŭzo, pere de la dia graco, de la tutmonda paciĝo. Tial mi petas vin, patro mia dolĉa, ke vi kun prizorgemo kaj kun malsata deziro pri paco kaj pro honoro al Dio kaj savo de la animoj, uzu la ilojn de via povo kaj virto. Kaj se vi, patro, dirus al mi: «La mondo estas tiel malkvieta: kiamaniere mi atingos pacon?», mi diras al vi, je nomo de Kristo krucumita: tri ĉefajn aferojn oportunas, ke vi plenumu per via povo.

Unue, el la ĝardeno de la sankta Eklezio, elĵetu la fetorajn florojn, plenajn je malpuraĵo

kaj avido, ŝvelajn pro malhumileco, tio estas la malbonajn pastrojn, kaj registojn, kiuj venenas kaj putrigas tiun ĉi ĝardenon. Ho ve, mia estro, uzu vian povon por elradiki tiujn ĉi florojn! Elĵetu ilin, por ke ili ne regu. Faru, ke ili klopodu regi sin mem en sankta kaj bona vivo. Plantu en tiu ĉi ĝardeno bonodorajn florojn, gvidantojn kaj registojn, kiuj estu veraj servantoj de Jesuo Kristo, prizorgu nur la honoron al Dio kaj la savon de la animoj kaj estu patroj de la malriĉuloj. Ho ve, kia konsterno estas vidi, ke tiuj, kiuj devas esti spegulo en memvola malriĉo kaj humilaj ŝafidoj, disdoni al la malriĉuloj la havaĵojn de la sankta Eklezio, kontraŭe vidiĝas en mondomaj plezuroj kaj oficoj kaj pompoj kaj vantaĵoj, pli ol se ili estus miloble laikaj. Kontraŭe multaj laikoj ilin hontigas, vivante bone kaj sankte. Tamen ŝajnas, ke la supera kaj eterna bono farigas devige, kion oni ne faras bonvole; ŝajnas, ke li permesas, ke la oficoj kaj la plezuroj estas forprenataj de lia fianĉino, kvazaŭ por montri, ke li volas, ke la sankta Eklezio revenu en sian iaman staton, malriĉa, humila, milda, kiel ĝi estis en tiu sankta tempo, kiam oni sin dediĉis nur al la honoro al Dio kaj al la savo de la animoj, prizorgante la spiritajn aferojn, kaj ne la materiajn. Fakte, de kiam ĝi atentis la materiajn pli ol la spiritajn, la aferoj iris pli kaj pli malbone. Tamen vi vidas, ke Dio pro tiu ĉi kulpo punis ĝin per aro de persekutoj kaj ĉagrenoj. Sed, patro, konsoliĝu, ne timu ian ajn okazintaĵon aŭ okazontaĵon, ĉar Dio tion permesas, por igi ĝian Staton perfekta; por ke en tiu ĉi ĝardeno paŝtiĝu ŝafidoj kaj ne lupoj honoron manĝantaj, kiuj ŝtelas la honoron ŝulditan al Dio, kaj ĝin donas al si mem. Konsoliĝu en Kristo dolĉa Jesuo; mi esperas, ke lia aŭskultado, la pleneco de la dia graco, la diaj rememoro kaj helpo estos kun vi, se vi kondukos laŭ la supredirita maniero. De milito vi transiros al grandega paco, de persekuto al grandega unuiĝo. Ne per homa povo, sed per la sankta virto vi venkos kaj la videblajn demonojn de la maljustuloj kaj la nevideblajn demonojn, kiuj neniam dormas super ni mem.

Tamen pripensu, patro dolĉa, ke vi malfacile povus fari tion, se vi ne plenumos la du aliajn aferojn restantajn por kompletigo de la ceteraj, nome, se vi ne revenos al Romo kaj ne hisos la standardon de la sanktega kruco. Kaj ne malestu en vi la sankta deziro pro iu ajn skandalo kaj urba ribelo, kiun vi vidus aŭ aŭdus; male, pli forta

brulu en vi la fajro de la sankta deziro fari tion baldaŭ. Tial ne prokrastu vian venon. Ne kredu la demonon, kiu ekvidas sian malgajnon, kaj tial klopodas vin skandali kaj deteni de viaj agoj, por ke vi perdu la karitaton kaj via reveno estu haltigata. Mi admonas vin, ho patro en Kristo Jesuo, ke vi venu tuj samkiel milda ŝafido. Respondu al la Sankta Spirito, kiu vin vokas. Mi diras al vi: «Venu, venu, venu; ne atendu la tempon, ĉar la tempo ne atendas vin». Tiam vi agos samkiel la buĉita ŝafido, kiun vi anstataŭas, kiu per senarma mano mortigis niajn malamikojn, venante samkiel milda ŝafido, uzante nur la armilon de la amvirto, celante nur prizorgi la spiritajn aferojn, kaj redoni la gracon al la homo ĝin perdinta pro sia peko.

Respondu al Dio, kiu vin volas, por ke vi venu por teni kaj posedi la sidejon de la glora paŝtisto, sankta Petro, kies anstataŭanto vi estas. Kaj levu la standardon de la sankta kruco, ĉar, kiel danke al la kruco ni estis liberigitaj (tiel diris Paŭlo), tiel, levante ĉi tiun standardon, kiu ŝajnas al mi refreŝigo de la kristanoj, ni estos liberigitaj de la milito kaj de la partioj kaj de aro de maljustaĵoj kaj la malfidela popolo estos liberigita de sia malfidelo. Kaj tiamaniere vi venos kaj atingos

la reformon de la bonaj pastroj de la sankta Eklezio. Redonu al ĝi la koron (kiun ĝi perdis) de la ardega karitato: ĉar tiom da sango estis suĉata el ĝi de la avidaj formanĝemuloj, ke ĝi iĝis tute pala. Sed konsoliĝu kaj venu, patro, kaj ne plu atendigu la servistojn de Dio, kiuj ĉagreniĝas pro la deziro. Kaj mi, mizera mizerulino, ne povas plu atendi, kvankam mi vivas, ŝajnas al mi morti mizere, vidante tiom da malhonoro al Dio. Tamen ne malproksimiĝu de la paco pro ĉi tiu bolonja okazintaĵo, sed venu, ĉar mi diras al vi, ke la sovaĝaj lupoj metos siajn kapojn sur vian sinon, samkiel mildaj ŝafidoj, kaj petos pardonon de vi, patro.

Mi neniom aldonas. Mi petas, patro, ke vi aŭdu kaj aŭskultu, kion diros al vi frato Raimondo kaj la ceteraj filoj, kiuj estas kun li, kiuj venas je nomo de Kristo krucumita kaj de mi; ili estas veraj servistoj de Kristo kaj filoj de la sankta Eklezio. Pardonu, patro, mian malkleron; kaj la amon kaj la doloron, kiuj igas min paroli, senkulpigu min antaŭ via papa moŝto. Donu al mi vian benon. Restu en la sankta kaj dolĉa amo al Dio. Jesuo dolĉa, Jesuo amo. ■


*Katerina el Sieno, trad. Vincenzo Musella
(el "Itala Antologio")*

La 10-a de Aprilo estas la datreveno de la morto de la franca teologo kaj sciencisto Pierre Teilhard de Chardin (1881-1955)

LA "MALPERMESITA" JEZUITO

Jezuita pastro, konata kiel evoluisma sciencisto kaj teologo, li klopodis akordigi la evoluisman teorion kun la doktrino de la prapeko, esprimante opiniojn, kiuj tiutempe estis taksataj nekonformaj al la oficiala doktrino de la katolika Eklezio (estas kurioze, pri tio, ke li estis malproksima ido de Voltaire, laŭ patrina flanko); li devis lasi la instruadon de paleontologio kaj geologio ĉe la katolika Instituto de Parizo, kaj estis forsendita al Ĉinio, kie li restadis de 1926 ĝis 1946 plenumante gravan sciencan aktivadon.

Reveninte al patrolando, li petis de la romaj ekleziaj aŭtoritatoj la rajtigon instrui ĉe la Kolegio de Francio, sed la rajtigo estis rifuzita, kaj eĉ li estis invitita forlasi Francion; li do ekloĝis en Usono, sed malmultajn jarojn poste, en la tago de Pasko de 1955, li mortis pro koratako. Li estis sepultita en la tombejo de la novica domo de jezuitoj en Saint Andrew on Hudson, nuntempe



Hyde Park of New York.

La graveco de Teilhard de Chardin, kiel teologo kaj samtempe sciencisto, kuŝas en lia strebo starigi harmonian ligon inter scienca penso kaj religia penso.

La tradicia katolika ortodokseco akuzis lin pri panteismo, probable ĉar liaj teorioj, tre originalaj, ne estis ĝuste komprenitaj; kvankam liaj verkoj neniam estis metitaj en la Indekson (nome, en la liston de la libroj kies legado estis malpermesita al katolikoj), dekreto de 1958 de la Sankta Ofico, tiutempe gvidata de kardinalo Alfredo Ottaviani, devigis la religiajn kongregaciojn forigi la verkojn de la jezuito el la bibliotekoj, pro tio, ke ili «entenas tielajn ambiguecojn kaj ankaŭ tiom gravajn erarojn, ke ili ofendas la katolikan doktrinon».

En 1962 la jezuita teologo Henri de Lubac (kiu dum kelkaj jaroj, akuzata pri modernismo, estis forigita el la instruado, sed poste estis nomumita “spertulo” de la Vatikana Koncilio kaj fine kreita kardinalo) kuraĝe asertis, en franc-lingva eseo, ke la penso de Teilhard estas en kontinuo kun la tradicio de la Eklezio, aparte kun Sankta Paŭlo; sed estis haltigitaj la tradukoj al aliaj lingvoj.

Akra kritiko al la penso de Teilhard venis ankaŭ en 1966, de Jacques Maritain. Irante kontraŭflue, Paŭlo la 6-a, en parolado de la 24-a de Februaro 1966 pri la rilatoj inter scienco kaj fido, asertis kontraŭe, ke la klarigo pri la universo liverita de Teilhard manifestas, anstataŭ nei, «la ĉeeston de Dio en la universo kiel Inteligenta kaj Kreanta Principo».

Malgraŭ tio, kiam en 1981 la ŝtata Sekretario Agostino Casaroli skribis al monsinjoro Paul Poupard, tiam rektoro de la Katolika Instituto de Parizo, ke la «akrvida percepto de la dinamis-

mo de la kreado» de Teilhard kaj lia «ampleksa vido de la estiĝo de la mondo kuniĝas kun nekontestebla religia fervoro», la vatikana gazeto *L'Osservatore Romano* rapidis precizigi, ke ĉiel ajn tia eldiro ne devas esti komprenata kiel “rehonorado” de la jezuito.

Nur en pli ĵusa epoko (1987) Kardinalo Ratzinger, poste Papo Benedikto la 16-a, en sia verko *Principi di Teologia cattolica* (Principoj de katolika teologio) allasis, ke unu el la ĉefaj dokumentoj de la dua Vatikana Koncilio, «Gaudium et Spes» (pri Eklezio kaj nuntempa mondo, 1965), estas forte trapenetrita de la penso de Teilhard. Oni notu, ke jam en 1985 “Espero Katolika” estis vidinta tian rilaton, publikigante artikolon de Roderic McDermott, kiu i.a. tekstis: “apenaŭ nece-sas emfazi, ĝis kia grado ĉi tiu teilharda sinteno respeguliĝas en la tre pozitiva dokumento «Gaudium et Spes» de la Dua Vatikana Koncilio” (EK 9/1985)

Pozitiva juĝo estis esprimita de Papo Johano Paŭlo la 2-a en letero de la unua de Junio 1988; Benedikto la 16-a asertis (la 24-an de Julio 2009), ke tiu de Teilhard estis granda vizio; kaj fine la ĵusa encikliko de Papo Francisko «Laudato si'» (Estu laŭdata, ĉe ĉapitro 83, post la aserto ke “la fina celo de la vojirado de la universo estas en la pleneco de Dio, kiu estis jam atingita de Kristo resurektinta, pivoto de la universala maturiĝo”, aldonas en piednoto 55: “En ĉi tiu perspektivo lokiĝas la kontribuo de P. Teilhard de Chardin”.

Estas por mi kialo de fiereco la fakto ke, en Esperanto, ampleksaj kaj ripetaj artikoloj pri Teilhard de Chardin estis publikigitaj de “Espero Katolika” jam ekde 1964, nome, kiam la teorioj de Teilhard estis (milde dirite) rigardataj kun suspekto: por pliprofundigo mi resendas al ili (www.esperokatolika.org). ■ *Antonio De Salvo*

RADIO VATIKANA - ELSENDOJ EN ESPERANTO

La elsendoj okazas trifoje semajne, en la sama horo 21:20 MET (19:20 UTC).

DIMANĈE kun daŭro 8-minuta kaj **MERKREDE KAJ ĴAŬDE** kun daŭro 9-minuta.

Por aŭskulti ilin per la Interreto:

Rekte je la indikita horo: <http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/diretta.asp>

Laŭpete: http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp

Arkivo: <http://www.radio-vatikana-esperanto.org>

Skribu al: RADIO VATIKANA - ESPERANTO, SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO

Ret-poŝto: esperanto@vatiradio.va

Por ricevi retpoŝte la informilon de RV, petu abonon al: promo@vatiradio.va